



Oficiala Organo
de _____

Flandra _____

Ligo _____

Esperantista _____



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belga

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

Sekve al la malvaloriĝo de la belga valuto, la prezo de ĉiuj libroj eldonitaj eksterlande, treege plialtiĝis.

Pro tiu kaŭzo ni provizore ne renovigos la stokon de F. E. I. kaj reaĉetos nur laŭproporcie de la ricevitaj mendoj.

La varoj de kiuj restas provizo, estas vendataj je la originala prezo, ĝis elĉerpiĝo.

La novaj prezoj estos kalkulataj kiel eble plej favore; sekve ni estas devigataj provizore ne plu konsenti rabaton al la grupoj, sed anstataŭe la sendkostoj ne devas esti pagataj, escepte por mendoj de malpli ol 10 frankoj.

EL LA PREZARO:

Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	Fr.	7,50	broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor		10,—	»
La Du Amatinoj — de Musset		7,50	»
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf		12,—	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf		12,—	»
La Infanoj de Betlehem — Selma Lagerlöf		5,—	»
Dialogoj kaj Komeditoj — E. Dahl		3,75	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto		4,—	»
La Stranga Butiko — R. Schwartz		17,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz		17,—	»
Gaja Lernolibro (ilustrita)		12,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck		5,—	»
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)		2,—	»
Schidlof Zakwoordenboek		22,50	»
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)		15,—	»
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)		10,—	»
Flageto por biciklo		6,—	»
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto		2,—	»

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Vedra stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.

Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.


Glumarkoj « Vredesaktie » po 3 fr. por 100.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Redakcia-
adreso:
Houwerstraat, 22
Antwerpen.
Tel. : 277.51.



Administranto :
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel. : 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belga
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.
Poŝtĉeko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
A. LODEMA kaj aliaj.

Flandra Ligo Esperantista

Generala Kunsido en Antwerpen en Septembro.

En la ejo de la Antverpena Grupo « La REKTA VOJO » St. Jacobsmarkt, 98, Antwerpen, okazos la Liga kunsido. Ĝi malfermiĝos je la 10.30a matene.

TAGORDO :

1. Raporto de la antaŭa kunveno ;
2. Financa raporto de la L. K. K. de la 6a kongreso ;
3. Pri la ekzamenoj A kaj B. ;
4. Propagando (S.ro Lenaers) ;
5. Propono de S.ro J. Telling (Nederlando) pri Tutnederlanda Esperanto Ligo.
6. Reelekto de la Estraro.
7. Difino de la kongresloko por nia 7a.

Je la 13a posttagmeze la kunvenantoj iros al restoracio por tagmanĝi. (Partoprenantoj al la tagmanĝo bonvolu sin anonci almenaŭ 3 tagojn antaŭe skribe ĉe la redakcio; prezo de la tagmanĝo estos proksimume 8 aŭ 10 frankoj).

Je la 14a horo ekzakte la kunvenantoj trame aŭ aŭtobuse iros al la tombejo de Berchem kie je la 14.30a horo estos inaŭgurata la tomboŝtono de Juul Karnas. (Nepartoprenantoj al la kunveno aŭ tagmanĝo bonvolu sin renkonti apud la enirejo de la tombejo je la 14.30a).

Post la inaŭguro, se necese, daŭrigo de la kunsido.

LA ESTRARO.

(Vidu la ĵustan daton en la Septembra numero).

Mondliteraturo

LOPE DE VEGA

La 25an aŭgusto de la nuna jaro, Hispanujo rememorigos la trijarcentan datrevenon de la morto de la famega verkisto Lope de Vega, kies famo kaj gloro estas ja universalaj.

Oni alnomis lin « El Fenix de Loz Ingenios » (La fenikso de la Sprituloj) kaj « Monstruo de la Naturaleza » (Monstro de la Naturo) ĉar li vere estis neordinara geniulo pro sia frumatureco, la multenombro de siaj verkoj kaj la senfina varieco de sia inspiro, lin permesante estri la plej diversajn literaturajn specojn.

Lope Félix de la Vega Carpio naskiĝis en Madrido la 25 novembro 1562, kiel infano de ne riĉaj gepatroj, devenintaj de la provinco Santander. Proverbo asertas : Poeto naskiĝas ; oratoro fariĝas ; kaj vere, pri Lope de Vega, estas certe ke li estis denaska poeto. Kiam kvinjaraĝa li ekĉeestis lernejon, jam li verkis preĝversojn kaj fabletojn ; sed ĉar la malgranda knabeto ankoraŭ ne sciopovis skribi, li devis dikti siajn verkojn al pli aĝaj kamaradoj kaj dividi kun ili sian manĝeton, kiel pagon.

Dekjarulo, li jam estis studinta latinan lingvon, kaj la tiam nomatajn « homajn sciencojn » dancarton, muzikon, skermadon k. t. p. Oni diras ke li verkis sian unuan komedion « La Vera Amanto » kiam li estis deknujara.

Li perdis la gepatrojn tre frue, kaj la fajra karaktero de la junulo, kune kun la aventureca epoko de la tiama Hispanujo, lin puŝis al vera aventura vivo. Li, deksesjara, forkuris kun amiko, por vidi la mondon, ili estis arestataj pro ŝtelsuspekto. Post liberigo li estis servisto de episkopo de Avila, filozofia studento en Alcalá, marsoldato dum la militiro al Islas Terceiras (Triaĵ Insuloj), sekretario de la, por Flandroj malbonmemorinda Duko de Alba, militisto en la « Escuadra Invencible » (nevenkebla ŝiparo) kontraŭ Elizabeth de Anglujo. Li edziĝis dufoje; krom multaj ĉiaspecaj amaj aventuroj, li havis naŭ infanojn kaj fine, kortuŝita pro la frua morto de sia fileto Karlo kaj de sia dua edzino, li fariĝis katolika Pastro kaj respektata kaj amata tiel de la Kortego kiel de la popolo, li mortis sepdektrijara.

La verkaro de Lope de Vega estas ampleksa kaj varia. Krom dramajn verkojn, de li nomataj komedioj, sed inter kiuj laŭ nuna signifo estas multaj tragedioj kaj dramoj — li verkis lirikajn versaĵojn — romanojn, epigramojn, sonetojn, eposajn kantojn, ĉu seriozaj kiel « La Jerusalem Conquistador » (Jeruzalemo Konkerita), ĉu burleskaj kiel « Gatomaquia » (Katomilito) romanojn kiel « Dorothea, Pastores de Belen » (Bethlemaĵ paŝtistoj) k. t. p.

Sed pli granda gloro de Lope de Vega estas la komedioj. Oni kalkulis ke li, en sia tuta vivo verkis proksimume 1800 ordinare triaktajn kaj versajn, en la plej diversaj stiloj, el la religiaj, simbolaj ĝis la popolecaj. Tiel « homaj » ili estas ke, kiam la Universitata, popola aktoraro ludas ilin, antaŭ la plej neklera popolo de la hispanaj vilaĝoj, (en la ne sufiĉe laŭdataj Pedagogiaj misioj) ankoraŭ la vilaĝanoj vibriĝas kaj emociiĝas malgraŭ la malsameco

de tempoj kaj moroj kaj kutimoj. Liaj plej belaj komedioj estas « Fuente Ovejuna » « La Estrella de Sevilla » (Sevilla stelo) « La Moza de Cantaro » (La Kruĉknabino) « El Acero de Madrid » (Madruda Stalo).

Tia granda verkaro postulis rapidan verkadon, tiel Lope de Vega mem diras ke okaze li faris komedion en nur 24 horoj, kaj tial se ne ĉiuj estas bonaj, oni povas aserti ke « estas neniu malbona ».

Lope de Vega simboligas, pli ol neniu alia verkisto, la grandajn virtojn de la Hispana Popolo, nome, la kulto al honoro, al la parolo promesita, la respekto al virino, la sindono al la reĝo — tiam simbolo de justeco kontraŭ la perfortoj de feŭdaj nobeluloj — la arda amo al libereco. Li mortas kiam jam la potenco de la grandega Hispana imperio malkreskas, la Suno eksubiras. La surmara potenco estas rompita pro la malsukceso de la « Nevenkebla Ŝiparo » ; la surtera forto ekŝanceliĝas pro la heroaj batoj de la bravaj Flandroj, sed tiam brilegas la hela stelaro de la Hispana « ora centjaro » kies verkisto igis Hispanujon granda kaj amata de ĉiuj literaturemuloj.

Kaj inter ili, post Miguel de Cervantes, la unua loko, ne kontraŭstareble apartenas al Lope de Vega.

PAMPLONA.

AMALIA NUNEZ DUBŬS.

Leteroj el Esperantujo

IX.

AMIKO LA KOKO,

Estis dum la Jubilea Kongreso en Kolonjo antaŭ du jaroj. La belega kongreskonstruaĵo estis la centro de ĉiuj kunvenoj ; ĝi ankaŭ posedas sufiĉe altan turon, kie oni povis ĝui belegan elvidon super Kolonjo, trinkante tason da bona teo.

Kondukate de samideano S.ro Walter Lippmann, Akademiano, lia edzino kaj fileto, mi per lifto supreniris. Ĉe la 5a aŭ 6a etaĝo la lifto subite haltiĝis momenton kaj filmrapide mi rekonis kelkajn tre konatajn vizaĝojn: S.rojn Bastien, Kreuz, Isbrücker, Hans Jacob, Schoofs, Behrend (la du lastajn nun mortintajn) kaj aliajn. » Ili elkovas la ovon : « La Interkonsenton de Kolonjo », ŝerce diris S.ro Lippmann.

Du jaroj pasis... ĉu la kovaĵo de Kolonjo jam kreskis je granda patrin-kokino, sub kies flugiloj la tutmonda Esperantistaro sin sentas sendanĝera ? Ho, ve, la flugiloj estas tro malgrandaj ! Ĉar multaj kokidoj ne povas trovi lokon sub ili !

Mi ne komprenas la sintenadon de U. E. A. : Du jarojn oni laboregis por « tiri la ĉaron el la marĉo », sed, kvankam mi respektplene salutas la U. E. A. estraron pro ĝia laboro, mi devas riproĉi ĝin, ĉar ĝi ne uzas ĉiajn necesajn rimedojn, inter alie : ŝmiraĵon. La ĉefa malfacilaĵo kiun devas venki la U. E. A. estraro estas la financa. Kaj tial mi ne povas kompreni kial ĝi obstine rifuzas ĉiujarajn enspezojn de kelkmiloj da svisaj frankoj ! Malgraŭ la pledado en « Franca Esperantisto » de S.ro P. Petit, por akcepti duan aŭ eĉ trian landan asocion; malgraŭ la pledado de sia vic-prezidanto, S.ro Isbrücker, por akcepti « Nederlandan Gruparon Esperantistan »

kiel duan landan asocion ; malgraŭ la multripetita demando de « Flandra Ligo Esperantista » U. E. A. rifuzas helpon. La Nederlanda Gruparo Esperantista enhavas 2.000 membrojn. Tio signifas : 1.000 svisajn frankojn por U. E. A. ĉiujare. Krom tiuj 1.000 Sv. Fr. U. E. A. rifuzas ankoraŭ pli.

Sed, la statutoj, vi diras ! Oni ne ŝanĝos ilin ! Kial ? Mi ne volas scii tion. Sed mi volus scii *kial* oni difinis ke nur unu asocio de ĉiu lando estas akceptata kaj ankaŭ *kiu(j)* proponis tion. Ĉu U. E. A. kuraĝas publikigi la protokolon de la kunveno en kiu oni decidis tion ? Mi timas ke ne.

Ĉu oni ne ekridas, legante en la jarlibro 1934 (jarlibro 1935 nun en julio ankoraŭ ne aperis) : ke U. E. A. volas « esti ĉio por ĉiuj por ĉiujn gajni ».

Se mi ne eraras ekŝiĝis S.ro Isbrücker antaŭ unu jaro kiel membro de « La Estonto Estas Nia », la landa asocio de Nederlando. Do, la Vic-Prezidanto de U. E. A. ne apartenas al landa asocio !

Krom la financa helpo U. E. A. ankaŭ rifuzas moralan helpon. « Heroldo de Esperanto » volas servi al la mondmovado, sed kvankam ĝi estas multe pli valora kaj aktuala por la movado ol la organo de U. E. A. « Esperanto », U. E. A. ignoras ĝin same kiel N. G. E. kaj F. L. E.

Bonvolu pardoni min pro tiu-ĉi iom « amara » letero. Sed mi povas certigi al vi, ke la lasta vorto pri la aliĝo de F. L. E. al U. E. A. ankoraŭ ne estas elparolata !

Kun konataj sentoj,

R. LA VULPO.

Esperantista Ŝipveturado al Vlissingen

(7 JULIO 1935)

*« Tra la Nederlandoj
Al profunda, larĝa mar'
Drivis sur la Skeldo
Flandra Esperantistar' »*

La suno regis en la ĉielo, la vento blovis super la lando kaj flirtis majeste ĉe la masto de la vaporŝipo « Friesland » la kara, verda Steloflago. Samideanoj el Antwerpen, Gent, Aarschot, Hoboken, Mortsel kaj Mechelen intersalutis unuj la aliajn ĝoje ridetante...

Akurate je la oka... kaj duono la boato debordiĝis kaj gajrapide ni veturis inter la verdaj bordoj de la Skeldo.

Iom melankolie ni alrigardis la « Vilaĝon de la Senlaboruloj, la tendaran kampon, trafa bildo de nia nenormala tempo.

La malgrasa preĝejoturo kaj la dika « Kamparana Turo » — Double-Pat kaj Patachon — ankoraŭ longtempe malĝoje vidis nian foriradon... Sed la « Friesland » tuj iĝis flosanta balo, kies amuza Jaztamtamo enamigis la ĉiam junan geverdstelanaron.

Sed la boato havis ja ankaŭ aliajn kvalitojn : ĝi donis okazon al la ripozemuloj dolĉe revii pri ondetoj kaj verda insulo de la marlando « Zuid-Beveland », pri la internacieco de la navigado : ni ja vidis

Francajn, Nederlandajn, Belgajn, Anglajn, Japanajn, Norvegajn kaj Brazilajn ŝipflagojn. Ĉu ili estis komprenantaj la signifon de nia paĉstandardo ?

La trinkemuloj eĉ pensis sin trovi en iu trinkado-paradizo, kie ankoraŭ ekzistas la libera vendraĵto de ŝatataj alkoholaĵoj.

La Hobokenaj samideanoj ludis interesan kaj samtempe praktikan kartludon. Unu el la kartoj eĉ mencias « Ĉu la amo estas dolĉa ? »

« Jes ! » respondis certe la amemuloj kaj geamantoj, kiuj tre ĝojis pri la lulanta veturilo, kaj pli ol unu dolĉa Barkarolo estis kantata flustre eĉ la orelo de la helknabinoj.

« Al vi bela amatino,
Ĉion benon donis Di'
Venu, mia Karulino
En la barkon tie ĉi ! »

Sed aŭskultante, vidante, babilante, manĝante, trinkante, ludante, dancante kaj kizante la horojn forflugis, multaj eĉ ne rimarkis kiam ni pasis Terneuzen... Suno, akvo, vento ! Jen la vera programo de tiu kvazaŭ marvojaĝo, sen... (feliĉe !) marmalsano.

Alvenante en la haveno de Vlissingen la vojaĝantoj disflugis el la boato kiel kolomboj el kolomba korbo...

Sro Lodema, la kapitano de la ekskurso klarigis al malgranda karavano kelkajn rimarkindajn konstruaĵojn kaj vidindaĵojn de la haveno, ankaŭ la kvartalon de la per la unua Nederlanda filmo tiel bone konataj : « Jantjes », la ŝtataj maristoj.

Kiu la unuan fojon vidas Vlissingen miras pri la pureco kaj la ordo, la spirito pri beleco kaj gajeco kiu regas en tiu ĉarma marurbeto, gvardanto de la Skeldo kaj kuraĝe alrigardante la largan Nordan Maron, « La Maron de 'l Nederlandoj ! »

Nur hazarde ni interkonatiĝis kun la prezidanto de la Vlissingaj Samideanoj, kiu nin certigis ke la movado restas stabila ĉi tie, tamen plenespere konvinkita pri la depest nun ne plu rompebla Esperanto.

Banado-Sunbanado-Promenado. Neniu raportis al ni pri la sekretoj, kiujn povas enhavi tiuj vortoj.

Sed finfine je la kvina akurate ĉiuj la kolomboj estis returnataj en la komuna korbo.

La « Friesland » denove nin lulis sur la ondetoj kaj denove seninterompe la dancado rekomencis...

Eĉ « Sarie Marijs » kaj « Sub signo de la nova lun' » (belaj memoraĵoj de la tri lastaj Flandraj kongresoj) alternis kun la lastnovaj jazbandkantoj. La Hobokena gejunularo denove kartludis : « Ĉu la amo estas dolĉa ? ». Kaj... kaj... post kvarhordaŭra migrado nun gaje nin bonvenigis « Double-Pat kaj Patachon », la de niaj Antverpenaj samideanoj tiel amataj turoj...

Kaj kiam je disiro ni vidis la adiaŭan kisadon, ni murmuris kanton de la malfeliĉe ne partopreninta poeto Jan Van Schoor :

« Unu kison je l' renkonto,
Unu kison je l' forir'
Inter ambaŭ milionon
Interŝangis ni sen spir' »

Gis la sekvonta fojo.

P. V.

Rakonto sen Titolo

Tradukis : La Paca Stelo, Esperantista grupo en Ronse, kun afabla permeso de la aŭtorino, Louisa DUYKERS

Patrino diligente kroĉtrikas blankan lanan infantrikotveston, kaj patro sidas en profunda apogseĝo, fumante cigaron kaj legante sian ĵurnalon. Li ne levas la okulojn kaj ne rimarkas ke la juna Jimmy vagadas ĉirkaŭ li kun dezirantaj okuloj.

Jimmy estas 2 1/2 jara, vera trezoro de infano kun mikskolor-blondaj bukloharoj, friponaj bluaj okuloj kaj ĉarmigaj ruĝaj vangoj. Friponeto, kiu faras la plej danĝerajn friponaĵojn kaj vivigas sian patrinon en konstanta timo. Momente tamen, lia vizaĝo montras anĝelan esprimon, kvazaŭ li neniam dum sia vivo malordigis la domon.

Sed vere, paĉjo estas tie kaj tio estas neatendita feliĉo, kion Jimmy scipovas taksi. Ĉiutage, paĉjo iras Bruselon por siaj aferoj; kiam li matene frue forveturas, Jimmy dormas ankoraŭ kiel rozo, kaj vespere, kiam li revenas, la knabeto denove estas en songolando. Sabate tamen, patro revenas frue en la posttagmezo kaj tio estas granda okazantaĵo en la vivo de Jimmy. Lia patro estas por li speco de supernatura estaĵo. Li ja povas, kion aliaj ne povas. Kun Jimmy sur la ŝultroj, la ĉambron aŭ ĝardenon ĉirkaŭpromenadi aŭ dancadi ĝis kiam Jimmy skuigas pro ridado, aŭ elblovi belajn fumondetojn kiam li fumas cigaron, kaj fine elirigi el la fortepiano ĉiujn tiujn mirindajn sonojn, kiajn Jimmy ŝategas.

« Paĉjo, Paĉjo ! » murmuris la knabo; kaj tiu vorto plenigas tiel bone lian koreton kiel lian buŝeton.

« Venu ĉe mi Jim-Jim » invitas patrino ridetante. Sed li eĉ ne rigardas ŝin.

Panjo, kompreneble, ankaŭ tre afabla estas, sed laŭ siaj manieroj; kaj li freneze amas ŝin. Li sekvas ŝin la tutan tagon tra la tuta domo, aŭ ludas aŭ promenadas kun ŝi, kaj demandas ŝin mil kaj unu klarigojn je kiuj iafoje ŝi respondas senatente.

Ofte ŝi ankaŭ povas rakonti tiel mirinde, ke li aŭskultas kun malfermita buŝo kaj brilantaj okuloj. Jes, patrino estas vera trezoro kaj li amas ŝin per sia tuta infankoreto. Sed... la novaĵo iom estas for! Patrinon li ja vidas la tutan tagon; ŝi ridas aŭ admonas kaj ankaŭ klakas sur lia postaĵo kiam li estas tro moviĝema... proksimume ses fojoj ĉiutage. Ĉiam li scias ke ŝi estas tie kiam li bezonas ŝin, preta por helpi lin. Pli ol unu fojo, estus al li pli agrable kiam oni lasus lin al liaj propraj inspiroj por malkovri la mondon je lia maniero. Libereco estas io multvalora, kaj la patrino atenta okulo povas esti iomete tro ĝenanta. Estas nur nature ke li, kiel li ja amas sian patrinon, kelkfoje ribeliĝas kontraŭ ŝia aŭtoritato.

Kontraŭ paĉjo, li tion ne kuraĝus. Li eĉ ne ekpensas pri tio. Lia admiro por li estas tro granda: en lia ĉeestado Jimmy estas dolĉa kiel ŝafido, almenaŭ la unuan duonhoron.

Hodiaŭ li ĉirkaŭvagadas la patran apogseĝon kaj avide atendas rigardon, rideton aŭ plej malgrandan kuraĝigon, kiu konigas lin

ke paĉjo estas prĉta por lasi sian filon grimpeti sur siajn genuojn, meti sian nazpinĉilon sur lian propran malgrandan nazeton, meti sian cigaron inter liajn ruĝetajn lipetojn. Kun liaj plej allogantaj signetoj kaj karesantaj okuletoj, ne deturnante siajn rigardojn de li, malgranda Jimmy marŝetas per siaj fortikaj kruretoj ĉirkaŭ patron, kiu nunmomente reprezentas lian tutan mondon.

« Paĉjo, Paĉjo ! » li denove flatas.

Sed per nenia rigardo paĉjo honoras lin, legas sian ĵurnalon kun kuntiritaj brovoj, kaj nerve tiras al sia cigaro. Li aspektas decidite malbonhumora kaj ĉiuj allogaĵoj de la knabeto, anstataŭ kontentigi lin, nur pli kolerigas lin. Jam kelkfoje li, kvankam silente, abrupte forpuŝis tro entrepreneman maneton etenditan al la cigaro, sed Jimmy ne ĉesas; li posedas volon kaj intencas atingi nun aŭ baldaŭ sian celon; li eĉ opinias ke paĉjo ludas, repuŝante lin, kaj kiam paĉjo denove, multe pli kolere repuŝas, ridegas la knabeto pro plezuro kaj kuratakas por surgrimpi patron genuon kaj finfine perforte ekkapti la deziratan cigaron. Panjo, kiu observas la tutan paradon, jen ridetante pro la allogludo de Jimmy, jen kapskuetante pro la rimarkeble malbona humoro de sia edzo, respondas per afabla rideto al la ĝoja ridbruo de la infano.

Sed paĉjo ekkoleras serioze — malfacile li povus klarigi la kialon — kaj forte insultas :

« Ĉu vi ne povas forkonduki tiun infanon en la kuirejon, Mia ? Ĉu vi ne povas kompreni ke mi estas laca kaj bezonas ripozon ? »
Patrino levigaŝ kaj demetas sian manlaboron.

« Venu Jim, patro estas laca, » ŝi diras kaj iras al la infano, kiu kun malfermegaj okuloj, plenaj je miro kaj riproĉo alrigardas sian patron. Li intencis tiel bone, kaj kun tia ĝoja espero, li estis atendinta tiun sabatposttagmezon; la tutan matenon li eĉ estis obeinta eksterordinare, ĉar panjo estis promesinta, ke patro ludos se li estos tre bonkondukta. Kaj nun patro grumblas !

La maljusteco de tia ago, forte impresis la infaneton. La ĝoja vizagego malheliĝis kaj li lipgrimacis kvazaŭ li ekplorus; sed subite la kolero forpelas la malgajecon, liaj okuloj fulme brilegas, liaj vangoj flame ruĝiĝas, kaj patrino, kiu tion rimarkas, ekpripensas ke ŝia fileto neniam estas tiel bela ol kiam li estas furioza.

« Venu, » ŝi diras kvietige, prenante lian maneton, « mi forkondukos vin ĉe Lina ».

Sed li obstine retiras sian maneton kaj freneze piedfrapas.

« Mi tute ne volas iri ĉe Lina... Mi ne estis malbonkondukta... estas patro kiu malbone kondukas... »

Lia tuta anĝeleco foriĝis, li ŝajniĝas kiel senbrida diableto, forskuas de si la patrinajn manojn, kaj staras piedfrapante antaŭ patro. Ĉu ankoraŭ lasta fajrero de espero dormetas en lia koro, ke patro ŝanĝos sian opinion, ke li konvinkiĝos pri sia maljusteco kaj ĉion reboniĝos ?

Sed patro estas en tia nekutima malbonhumoro, ke li ne vidas la riproĉan rigardon de Jimmy, eĉ ne komprenas. Anstataŭ rekoni sian maljustecon, li plene kolerigaŝ kiam Jimmy en sia blinda furiozo, piedfrapas kontraŭ lia apogseĝo.

« Malsaĝa knabo », kriaĉas patro, kaj donas al li fortan baton sur lia buklokapo.

Jen la lasta guto. Jimmy ekkriegas terure, flankenpuŝas patrino, kuras al la pordo, ĝin malfermtiras kaj kuregas el la ĉambro. Patrino volas sekvi lin, sed patro diras :

« Restu ĉi-tie Mia... »

Si residiĝas, kaj silentas, ĉar ŝi scias ke elverŝi oleon sur la fajron ne estas konsilinde, sed ŝia vizaĝo anstataŭas parolojn kaj ŝia edzo denove grumbblas :

« Ĉu mi estas do murdisto ? »... Ĉu vi ne povas kompreni ke ŝarĝon kaj zorgon mi sufiĉe havas por deziri hejme silenton kaj ripozon ? Ĉu tio eble estas troa ?

Li estas tiel rimarkeble infanece kontraŭvola, ke ŝi eksentas emon mokridi lin. Tamen ŝi estas sufiĉe prudenta por resti serioza, ĉar ŝi scias, ke malbonhumora edzo, devas esti traktata tiel singarde, kiel malbonhumora infano. Ŝi scias ke patro tiom dorlotata estas kiom Jimmy se necese. Kaj cetere, estas vere, ke li havas multajn zorgojn kaj pene laboregas.

Tial ŝi kviete sidiĝas apud li, kaj murmuras kvazaŭ nenio okazis, kaj aŭskultas samtempe, ĉu ŝi ankoraŭ povas aŭdi sian fileton. Ne, fine li ne plu ploras; li eble serĉas konsolon ĉe Lina, lia atako de malespero preterpasis dank' al Dio.

Malpeziĝinte, ŝi dediĉas sian tutan atenton al sia edzo kaj provas persvadi lin al pli suna vivaspekto.

Si ja konas lin tiel bone, sian bonan, saĝan, karan edzon ! Ŝi konas neniun alian, kiu estas tiel bonkora kaj tiel inteligenta; sed infano li tamen estas; granda infano, kiu kelkfoje devas esti kontentigata kiel simpla infano.

« Kie restas la kafo ? Aŭ ĉu eble la servistino havas tro da laboro ? » li demandis kvazaŭ la mezurilo de liaj plendmotivoj estus plena.

« Mi ne scias kial Lina ne ankoraŭ ĝin alportis ... mi sonoros, ŝi trankvilete respondas, kaj iras puŝi sur la elektra sonorilbutono. Poste ŝi kuras al la fenestro kaj rigardas eksteren.

Kelkaj personoj preterpasas kaj ŝi rimarkas ke ili strange alrigardas la domon; eĉ kelkaj haltas kaj faras malaprobajn gestojn kies celo ŝi ne komprenas.

Puŝate de nedefinebla maltrankvileco, ŝi diras al sia edzo :

« La homoj tiel strange rigardas la domon... ĉu vi ne irus vidi kio okazas ?

« Kio do povus okazi ? ... Vi denove ion imagas ... Enverŝu por mi prefere tason da kafo... » li opinias.

« Ĉu la knabo estas malsupre ? » ... demandas la patrino al la servistino, kiu metis la kafleton sur malaltan tableton apud la patro.

« Ne... mi ne vidis lin, Sinjorino... »

« Tiam li denove ion malbonfaris » ; diras ekscitite la patrino kaj ŝia edzo viĉas ŝin subite paliĝi kaj elkuregi la ĉambron. Patro ne povas elteni la rigardon de ŝiaj okuloj kaj postkuregas ŝin.

Li atingas ŝin je la unua etaĝo ; la pordo de la stratoflanko estas iomete malferma kaj subite ili aŭdas Jimmy ridegantan.

Patro volas diri ion, sed patrino per gesto lin silentigas, senbrue malfermpuŝas la pordon kaj subite per mano kovras la buŝon por eviti ekkrion.

Tie sur la ŝtona fenestrotabelto de la malfermita fenestro, la kruroj balancantaj ekstere, sidas Jimmy, liaj implikaj bukloj sunplenaj, lia ridanta vizaĝo klinita al la strato, salutante per maneto kaj per sonora rido la homojn, kiuj lin alrigardas, jam forgesinte sian grandan ĉagrenon.

Patrino ne kuraĝas sin movi. Se la infano sin returnus, perdus sian ekvilibron, kaj falus sur straton ! Image, ŝi jam vidas lin kuŝantan sur la krudaj pavimoj, meze de sanglaĝeto kaj ŝi premas la manojn antaŭ la okuloj. Sed patro ne hezitas eĉ unu sekundon ; per du paŝoj li estas atinginta la fenestron kaj ekkaptas sian fileton tiel neatendite, ke la infano malantaŭen falas kontraŭ la forta brako, kiu lin premas kaj duone timigite rigardas en la patran vizaĝon.

Certe estas, ke li ion kuraĝigan legas en la patraj okuloj ĉar per sia bruetanta voĉeto, li triumfe krias :

« Paĉjo... la homoj ĉiuj diras bonan tagon al Jimmy... »

Paĉjo ne multe respondas, sed metas sian idon sur siajn ŝultrojn kaj trote malsupreniras la ŝtuparon. Jimmy ĝojkrias pro plezurego. Ĉu li vere antaŭ kelkaj minutoj ploris kaj piedfrapis kolere kontraŭ la patra apogseĝo ?

Nun li sidas intime sur la patraj genuoj kun sia plej angela vizaĝesprimo kaj paĉjo ekridas.

« Vi bubo » diras paĉjo kaj metas en la infanan buŝon, pecon da sukero en kafo trempita.

Sed panjo sopiras :

« Tiu infano iam kaŭzigos al mi kormalsanon ! »

El la libro : « *Tiel rakontas la Flandroj* ».

Bibliografio

(Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas, unuope ricevitaĵn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

ESPERANTAJ HISTORIEtoj I., de Peter Frey. Formato 13,5 × 19,5 cm. 48 paĝoj. Prezo : 7 B. fr. Adreso : Clausensvej, 26, Hoderslev., Danlando.

La libreto enhavas kolekton da historietoj plejparte konataj en mlutaj landoj. La eldonisto ne pretendas al literatura valoro sed al ofero de facile legeblaj tekstoj por komencantoj ; laŭ tiu vidpunkto ĝi kontentigos certe la gvidantojn de perfektigaj kursoj, ĉar lingve kaj stile ĝi estas tre bone ; krome la prezo ne estas tro alta.

PASKO, de August Strindberg. Dramo en tri aktoj. El la sveda tradukis Stellan Engholm. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 88 paĝ. Prezo : 12 fr.

Dum la 26a universala esperantokongreso en Stockholm teatra trupo sub gvidado de reĝisoro Sandro Malmqvist ludis unuaktan dramon, « Ludi kun fajro », de August Strindberg, la plej granda sveda verkisto. La prezentado estis multe laŭdata ne nur de la esperantis-

toj, sed ankaŭ de la profesiaj kritikistoj de la grandaj Stokholmaj
jurnaloj, kiuj estas tre severaj en siaj prijugo.

Nun s-ro Malmqvist ĵus entreprenis vojaĝon tra la baltaj landoj
presentante, krom la dramo jam menciita, la triaktan dramon « Pas-
ko » de la sama aŭtoro. La geaktoroj rikoltis grandan laŭdon. La
tradukon faris s-ro Stellan Engholm, kies nomo estas tre bone konata
tra la mondo tiel pro lia majstra traduko de la grandega verko Gösta
Berling kiel ankaŭ pro liaj originalaj verkoj, el kiuj la debutromano
Al Toronto jam aperis en dua eldono. « Pasko » estas unu el la
plej konataj kaj ŝatataj dramoj de Strindberg, multfoje presentita
en Svedujo kaj ankaŭ en aliaj landoj.

La libro presentigas en bela eksterajo kaj preso.

« DIE POORTE » bracht ons twee nieuwe boeken uit de wereld-
letterkunde :

DE GEEST DER GOTHIEK, van Karl Scheffler, de bekende
Hamburger kunstenaar, die open oog heeft voor de Vlaamsche kunstenaar
en die ons in dit boek het noodige materiaal bezorgt om met kennis van zaken de schatten van ons rijke Vlaanderen te leeren
schaffen en genieten. Ieder toerist en welke Vlaming is het niet tegenwoordig ? — moet dit boek gelezen hebben, om met meer genoegen
en kennis van zaken de kunstschaten van ons land te leeren bewonderen
en zich op kunstgebied een gezond oordeel te vormen. Boeiend als een roman,
leerrijk als tien boekdeelen, aangenaam van voorstel en afwisseling,
ziedaar de bijzonderste kwaliteiten van dit boek.

HET VERHAAL VAN VIGA-LJOT EN VIGDIS, door Sigrid Undset.

Het is een jeugdwerk waarin nochtans de hooge begaafdheid van de schrijfster reeds zijn stempel drukt, alhoewel het verhaal zelf somber is en ons toont hoe een vrouw haar gekwetste eigen-
liefden kan stellen boven de in haar binnenste nog smeulende liefde voor haar minnaar, en hoe zij pas ontwaakt, als haar zoon, op haar bevel,
den wilden Viga-Ljot onthoofd heeft. Een heel menschenleven ragfijn ontleed
en ademloos volgt men de beide hoofdpersonen op hun tragische levensbaan.
Geen lectuur voor kinderen, maar daverende levensstrijd met historischen ondergrond.

Zooeven verschijnt nummer 6 van deze hoogstinteressante serie :
AVONDEN OP DIDANJKA, van Gogol.

Ook geen onbekende, die leuke Oekraïensche verteller, die ons bij de heksen brengt,
de smid naar keizerin laat varen op den rug van den duivel, die de maan gestolen had,
of de griezelige geschiedenis vertelt van de filozof, die drie dagen moest waken bij het
lijk van 'n schoone freule, die met den duivel omging. Onbetaalbaar van humor
zijn sommige tafereeltjes, bijvoorbeeld als de stoere kozakken, zat bedronken,
beginnen te weklagen, elkaar te kussen, en de aanvoerder, 'n oude grijze kozak
al snikkend aan zijn gevangene vertelt dat hij « 'n arme wees » is !

Vraagt inlichtingen aan den propagandist voor « Die Poorte » L. Calloens,
Erembodegemstr., 29, Aalst, die prospectus zal zenden. Prijs der boeken : 8,75 frank,
in serie genomen.

Diversaĵoj

VOOR HET GRAF VAN JUUL KARNAS

De oproep aan de Vlaamsche esperantisten in het nummer van Mei is niet te vergeefs geweest ! Er is flink bijgedragen, zoodat het komiteit in staat is om zijn werk voort te zetten. Er is al een keuze gedaan tusschen verschillende ontwerpen ingezonden door een architekt-esperantist.

In September (1) zal het gedenkteeken onthuld worden om 14 30 uur, op het Berchem kerkhof.

In het nummer van Oktober zal de volledige verantwoording der ingekomen gelden worden gepubliceerd. Wij kunnen echter niet wachten en bedanken reeds nu hartelijk de milde gevers. Wie alsnog wenscht bij te dragen, het adres van den schatbewaarder is : H. Van der Mast, Tweelingstraat, 6, Antwerpen.

NAMENS HET KOMITEIT :

Mej. L. JOUKES, Voorzitster.

Hr. A. MEIRE, Schrijver.

ESPERANTO-HEJMO ANKAŬ EN FLANDRUJO

Mi skribas tiun ĉi bileton en agrabla situaĵo, meze de la belaj erikejoj de niaj flandraj « Kempen », ĉe la sablomontetoj en kiuj ludas miaj infanoj ŝirmataj per laŭbo kaj arbetoj kontraŭ la varmegaj sunradioj.

La dommastrino estas lerta esperantistino afabla, kiu volonte parolas pri nia movado, iam ĝin aktive partoprenis, sed pro sanaj kialoj devis forlasi sian medion kaj kreis tie ĉi esperantan restadejon, ripozdomon meze de la bela naturo.

Estas iedala loko por pasigi kelkajn tagojn de la somerferioj, pli saniga aero kaj medio al la ofte por infanoj malboninflua marbordo. (Sro Snykers, la estro de la Hotel Metropole, 32, Kerkstrato, Oostende, pardonu al mi tiun aserton, cetere ĉiam restos sufiĉe da amatoroj por la marbordo).

Mi nur atentigas miajn gesamideanojn speciale la gepatrojn pri la vera oportuna loko, por ke ili ne iru al kiu ajn restadejo aŭ pensio en la Kempen. Iru al « Kempisch Tehuis », Grensstatie, 124, Turnhout, Weelde Statie, kaj vi estos kontentaj pri la saniga aero, la diversaj amuzadeblecoj por infanoj, la modestaj prezoj por flandra kuirejo, la afableco de la mastrino de nia Flandra Esperantista Hejmo.

L. CALLOENS, Prez.

KONGRESKANTARO

El la provizo de kantaroj venditaj dum la Brusela kongreso, restas nur 11 ekzempleroj. Ili kostas 3 frankojn kaj estas haveblaj ĉe F. E. Instituto. La kompleta vendoprezon estas je profito de « Flandra Esperantisto ». Aĉetu tuj la lastajn ekzemplerojn ĉar represon ne okazos.

(1) Datum nader aan te duiden in volgend nummer.

CENTRA ESPERANTO LIBREJO en Hago, dissendis cirkuleron por anonci ke la akciuloj decidis unuanime malfondi la societon. El la cirkulero ni sciigas ke la societo, fondita en 1919, pagis, dum la laborjaroj, al siaj akciuloj entute 83 % da dividendo.

La lasta jaro lasis malmultan profiton kaj la estraro timas pri eventualaj perdoj por la akciuloj. Pri la kaŭzoj la cirkulero i. a. diras : « Instruistoj, oficistoj, asocioj, institutoj, k. t. p. sin jetis al la laboro de libristo por perlabori iom da mono en la nuna kriza epoko, vendante je malsamaj prezoj ».

« Perlabori iom da mono », eĉ iom tro da mono, sur la dorso de la Esperantistoj, el kiuj minimume 95 % venis al Esperanto, estas la ĉefa kaŭzo kiu instigis multajn asociojn al fondo de propra eldonejo.

Ankaŭ je kreo de F. E. I. iu monopolema societo insidis pri perlaboro de iom da mono, kaj la Centra librejo estas unu el la 3 societoj, kiuj rifuzis ekzistrajton al la Flandra Esperanto-Instituto.

G. D.

La urbestraro de unu el la ĉefaj urboj de la ĉirkaŭo de Parizo (Saint-Denis) interesigante pri la valoro de Esperanto tra la mondo, komisiis al la konservatoro de sia respektiva urba biblioteko, la ŝargon por kolekti ĉiuspecan materialon necesan al la kreo de *permanenta* (konstanta) esp. sekcio en kiu oni povos konsulti la progreson de nia lingvo en ĉiuj landoj sen distingo de tendencoj, doktrinoj aŭ filozofioj.

La momento estas ege oportuna por bombardi, de ĉiuj anguloj de la mondo, la konservatoron per ĵurnaloj, revuoj, broŝuroj, afiŝoj, vortaroj, lern-kaj legolibroj k. t. p. Eĉ se ili estas verkitaj nacilingve, tiom pli bone; sufiĉas ke ili temu pri esperanto.

Ne forĵetu vian materialon post lego, sed pensu ĉiam al la ekspozicio, kiu dankege kolektas ĉiom *laŭ nacioj*.

Se vi deziras korespondi, aldonu al via nomon kaj adreson al via donaco. Ne gravas ĉu via materialo estas malnova aŭ eluzita. Kiom eble, *reproduktu* ĉi tiun alvokon eĉ *nacilingven*, ĉar temas pri serioza afero.

Ni forĝu tiel, ke ĉiuj urboj sekvu la ekzemplon de Saint-Denis.

Sendu la tuton laŭ la jena adreson :

Monsieur le Conservateur des Musées, Bibliothèques et Archives de la Ville de Saint-Denis, « Section *Esperantiste* », 4, Place de la Légion d'Honneur, à Saint-Denis, via-Paris (Francujo).

SAGECO

Paul Verlaine.

Super tegmento la ĉiel'	Ho Dio mia ! Jen la viv'
blue spegulas.	simple serenas.
Super ĉi tegmento la arb'	Tiu pacema la murmur'
la branĉon lulas.	el urbo venas.
La sonorilo en aer'	Kion estas farinta vi,
dolĉe tintadas.	vi en ĝem' plora ?
Jen birdo, kiu sur la arb'	Ja kion faris do, ho vi,
plendon kantadas.	el junec' glora ?

El la franca: F. R. (Brugge).

GURDA LUDO

Aŭskultas mi sur strat'
Muzikon ekzotikan,
La kanton de la gurd'
Arion erotikan...

La juna bohemin'
Rigardas min pasie ;
Okulojn nigrajn ŝi
Ruligas tradicie.

Nun tamburina bru'
Eksonas : nova tono !
De l' kant' la nura cel'
Ne estas am'... sed mono !

POL VARENS.

Gratuloj

Al sia estimata sekretario kaj S.ino Van den Steen, Flandrema Grupo Esperantista el Antverpeno, lutkore prezentas gratulojn, okaze de la naskiĝo de filineto : Frieda.

Grupa Vivo

AALST, RUSELARE, RONSE : Viaj artikoloj alvenis tro malfrue por tiu-ĉi numero.

BRUGGE. — KATOLIKA JUNULARA ESPERANTO GRUPO.

Same kiel kelkaj aliaj grupoj ni ankaŭ nur malofte sendas novaĵojn pri nia vivostato. Estas strange kiel en Brugge oni neniam kapablas starigi sen multe da peno. Ankaŭ nian grupon oni kontraŭagas tiel, ke oni malfacile povas varbi kelkajn anojn. Sed, aliflanke, tiam oni de tempo al tempo varbas vere fervoran laboranton; kiel ni, antaŭ kelkaj monatoj. Mi pensas ke ĉiuj, kiuj iris al la kongreso jam konas lin. Dum la studotempo nia grupo kompreneble suferis pro forestantoj k. t. p. Eĉ antaŭ tiu tempo ĝi suferis pro ne intereso.

Li tute revigligis nian grupan vivon. Ni postulis paroladojn kaj tuj kelkaj enskribiĝis. Unu pri « bulgara poeto », alia pri « arto » (tiu lasta, nome Leo Bruggeman) daŭrigos dum sekvonta kunveno) A. Deprez pri lia vojaĝo en Rheinland, la profesoro pri « Volapük » kaj la gvidanto Meersman pri « la jeune Belgique ». Do la membroj de post nun povas esti certaj ke dum ĉiu kunveno estos io interesa. Tiu multflanke kleriginta kaj evoluinta knabo (eble tion kelkaj kongresanoj ankaŭ povis konstati) zorgas nun ankaŭ pri la fi-

nánca stato. Ni do iris al la kongreso, duope anstataŭ kvarope aŭ kvinope. En aŭtomobilo ! Nia plej juna membro salutis la gekongresanaron. Li asertas ke oni aplaŭdis pli pro li mem ol pro lia salutparolo.

Ĉu tio estas vera ? Ni nepre aténdas multajn respondojn al ĉi-tiu por ni peza demando. Ni revenis ĝojigitaj kaj samtempe malĝojigitaj. Ĝojigitaj pro la laŭ ĉiuj vidpunktoj granda sukceso de la kongreso, Malĝojigitaj pro tio kŝon ni aŭdis rilate nia sintenado al U. E. A. Kun la plej informitaj de nia grupo ni parolis pri tio, nia konkludo estas tre simpla : 1° — Ni daŭrigu klopodi aliĝi al U. E. A. Tio estas nepre necesa kaj nepre utila. Sed pro tio ni kompreneble ne bezonas re kaj re genufleksi. Se U. E. A. ne volas akcepti Fl. Ligon kiel nacian asocion, se ĝi daŭre montras malbonvoleman nekomprenemon, ni atentigu pri tio kiel eble plej multe da Esperantistoj pere de la revuoj... Ni kredas ke U. E. A. fine estas devigata akcepti nin.

2° La propono de S.ro Telling. Ni unue devas tre bone scii pri la « afero Telling » kaj pri la organizacio T. E. L. Due ni devas serĉi ĉu estas jam oportune aliĝi al T. E. L. Ĝis nun ni ŝtaris ĉiuj unu flanke de la alia rilate al U. E. A. Ni ne sukcesis.

Ĉu la nesukceso estos la kaŭzo de disputoj, malsimilaj opinioj rilate al la estonte sekvenda laborplano, sekve de plimalfortigo de nŝa Ligo ? Ni esperas ke ne. Ni opinias ke la sama agmaniero, ne ŝanĝita devas resti.

Ni akceptis en nia urbo la Danan Samideanon Tage Nielsen. En nia grupo li faris paroladon pri lia vojaĝo kaj pri la Esperanto Movado en Danlando. Ni akceptis ankaŭ Samideanon John Armstrong el Burton-on Trent. Espereble venos ankoraŭ multaj Esperantistoj al nia multege vizitita Brugge. Ni havis ankaŭ la plezuron gvidi tra la urbo Samideanon Dro. Fawcett, profesoro de homa geografio en la Universitato de London. Li estis kun grupo da studentoj. Certe la praktika uzo kaj utileco de Esperanto faris pli bonan efikon sur ili ol se ni estus farintaj dek eĉ sciencajn paroladojn pri Esperanto.

Noto de la maŝinskribistino (samideanino- kunlaborantino) :

Sro Lodema — mi petas vin : demandu al la skribinto de la artikolo de K. J. E. G. de Brugge — skribi pli bone legebla — kaj relegu tiun artikolon tre atente.

BRUSSEL. — N. E. L. E. — Mardon, la 24-an de junio, okazis la jarkunveno de nia grupo. Nian ĉefkunvenon ĉeestis multaj anoj.

En sia jarraporto la sekretario pritraktis la laboron faritan dum 1934-35. Kvankam li resume skizis la aktivecon de la Brusela sekcio, la efektivigita laboro montriĝis vere impona. La organizado de la 6-a Flandra Kongreso sendube estis ideala stimulo por nia grupo, en kiu laboremo kaj fervoro regas, dum ke la morala stato de nia rondo estas pli bone ol iam antaŭe.

La kasistino siaflanke raportis pri la financa stato de la grupo kiu montriĝis tre kontentiga. Kvankam la en-kaj elspezoj jaron post jaro kreskas, la enkaso ne estas granda sed tamen montras samfavoran staton kiel pasintjare. Plue ni eksciis el la raporto de la kasistino ke, dum la pasinta jaro, 14 el niaj anoj abonis al F. E. Tiu nombro ne estas sufiĉe kontentiga.

Poste estis la vico de nia komerca kasistino por raportoj pri la aktiveco de tiu aparta fako. Ke, por ĝin prizorgi, ni posedas « The right man in the right place » montras la floranta stato de tiu kaso. N.E.L.E. certe estas unu el la plej konsiderindaj klientoj de nia Instituto ĉar mirige granda estas la sumo de la negociitaj varoj kiuj, kvankam venditaj kun eta profito, postlasas, fine de la jaro, belan sumon. Krom tio nia grupo daŭre posedas per ĝi propran kaj varian varstokon. Tiu speciala kaso, dum sia kvarjara funkciado, konstante formis por ni monreverzon kiu tre utilos okaze de eblaj financaj krizoj.

Sekvis la raporto pri la biblioteko. Dank' al la oficialaj subtenoj nia librokolekto daŭre pliampleksiĝis. Se en la komenco nia legmaterialo konsistis el kelkdekoj da modestaj broŝuroj ĝi, dum la lastaj jaroj, pliriĉiĝis per valoraj kaj imponaj verkoj. El tio rezultiĝis ke nia libroŝranko iĝis tro malgranda...

La kongresa kasistino komunikis al la geanoj la situacion de la kongresfinancoj. Grandegajn sumojn atingis la porkongresaj en- kaj elspezoj. Gojiga fakto estas ke la kongreskomitato lerte financis ĉar, post pago al F. E. de 2 fr. po kongresano, postrestas kiel profito relative bela sumo kiu duone servos por subteni la Ligon dum ke la alia duono pliriĉigos nian grupan kason.

Kiel kontrolistojn de la diversaj kasoĵoj la grupo elektis s-anojn Akcaert kaj Broodcoorens.

Laŭstatute la estraro poste ekŝiĝis kaj per biletoj la anaro elektis sian novan estraron. Estis unuanime reelektataj : J. Vandendooren (prezidanto), E. Cortvriendt (sekretario), E. Sindhwad (kasistino) kaj I. Druant (komerca kasistino-bibliotekistino). La grupo decidis kompletigi la estraron kaj tiucele elektis kiel novajn estraranojn : A. Dekeyzer (helpsekretario), A. Akcaert (helpkasisto) kaj Broodcoorens (protokolisto).

La novajn estraranojn oni aklame salutis kaj la sekretario komencis la novan jaron komunikante la ĝojigan novaĵon ke la Provincestraro juŝ subtenis nin per nova subvencio (130 fr.).

N.E.L.E., kiu ĉiam larĝanime klopodis akceli la intergrupan kontakton en Brussel, regule invitis la aliajn Esperanto-organizaĵojn al siaj publikaj paroladoj, instruvesperoj kaj amuzaj aranĝoj. Reciproke la ceteraj Esperanto-grupoj nin invitis al siaj interesaj publikaj aranĝoj. Laŭ invito de « Nova Vojo », la tramista klubo, multaj el niaj anoj ĉeestis interesan paroladon de Ĉeĥoslovaka samideano en « Ok-hora Domo ». La 9-an de junio paroladis en nia ejo s-ano K. Moor pri « Esperanto en la Laborista Movado kaj I. P. E.-kongreso en Antverpeno, aŭgusto 1935. La lerta uzo de nia lingvo estis vere admirinda. Invito de « Brusela Grupo Esperantista » (sekcio B. L. E.) por ĉeesti la Esperanto-Tagon organizitan en la Brusela Ekspozicio, bedaŭrinde atingis nin tro malfrue. Tamen kelkaj el niaj anoj, ne atendante la oficialan inviton ĝustatempe anoncis sian partoprenon.

La 11-an de julio, okaze de la Flandra nacia festotago, ni grupe ĉeestis la « Oraĵ Spronoj » — feston en la urba teatro dum ke, je la fasado de nia ejo, flirtis la Esperanto-flago provizita de nigra-flava rubando.

MECHELEN. — **LA ESTONTO.** — Dum la somero ni daŭrigas la kunvenojn, kiuj de temp' al tempo iĝos promenadoj... se la membroj akurate ĉeestas.

Dum aŭgusto nin vizitos eksterlanda esperantista karavano. Ni insistas por ke ĉiuj niaj membroj ĉeestu por gvidi la fremdnaciaj gastojn tra nia urbo.

Ni ankaŭ atentigas pri la ĝenerala kunveno de la ligo la 22-an de septembro en Antwerpen, je kiu okazo oni enaŭguro memorŝtonon sur la tombo de nia ŝatata formortinta ĉefredakoro.

Ni ankaŭ ne forgesu, ke la ferioj tuj preterpasos, tial de nun ni jam varbu por la novaj kursoj en oktobro.

OOSTENDE. — **OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.** — La 27-an de junio ni kunvenis en nia ejo « Hotel de la Marine ». Kiel kutime ĉeestis 15 geamikoj. Post priparolado de la punktoj de nia tagordo, ni lernis la kanton «Sari Marys» aŭditan dum kongreso.

Nian veturadeton al Lophem de la 29an de aprilo, ni prokrastis pro diversaj malhelpoj. Ĝi okazis nur la 7an de julio dum tago ke la labirinto estis malfermata. Partoprenita de deko da biciklemuloj, ĝi bone sukcesis. Dum posttagmeze, post migrado en la arbaroj kaj vizito al la labirinto ni biciklis al Ghistel okaze de la kirmeso kaj la tago de Godelieve; ni tie bone amuzis nin. Ĉirkaŭ la 8a ni venis hejme.

Sur la programo ni havas : ĉe la fino de la monato : viziton al Knocke kaj alifoje viziton al la kanono « Leugenboom » ĉe Moere, ĉeeston de la procesio en Veurne kaj pilgrimadon al Dixmude.

Antaŭ kelkaj tagoj la grupo ricevis karton el Ĉekoslovakujo de Samideanoj kiuj vizitis nin la pasintan someron. Karton kiel oni kutime ricevas de samideanoj ne estas grava, sed tamen, tiu, kiun ni ricevis estis tre interesa, ĉar la diraĵoj estas preskaŭ tute en rimfrazoj.

Jen sekvas la saluton de « niaj ĉekaj amikoj » (Ni pravas diri tion; tio certigas al ni la karton).

Al belgaj gefratoj'

Forpasis jam tuta jar' de post vizito en Ostend'

Kiam min kaj kamaradon ferblovis al via lando vent'

Neniam mi lacigas havigi ree en memor'

Ostenda vivo enpenetrigis ĉion klare en la kor'

Dank' al vi gefratoj miaj, dank' por sincera bonven'

Estu ĉiuj salutataj, vizitu min dum somer'.

Mia lando estas preta bonveni vin tute sam'

Ho, venu kaj neforgesu, ke ni estas amikar'

Via sento, eĉ la celo estas tute sam'

Efike ni propagandu « Esperanto Ideal' ».

Antaŭ vesper' rigardante subiri la sun'

Estu certaj ke mi volus reveni jam tuj.

Via lando ŝajnas esti mia dua patroland'

Inter vi mi perdis koron, trovante amant'.

Salutataj estu fratoj ĉe la fino de la rim'

Mi ekpremas viajn manojn trans la landa lim'

Solè Karolo.

Boleslav — Ĉekoslovakujo.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

(Vlaamsche Esperantisten - Bond)

Voorzitter: Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.
Ondervoorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Grootte Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.
Brussei: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Drie Eikenstraat, 665.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », lokaal: Bovenzaal der stedelijke Bibliotheek, Wollemarkt; vergadering elke Vrijdag te 20 uur. — Briefwisseling: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54.
Nieuwpoort: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Langestraat, 6.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stacegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Maria-Hoorebeke: Gerard Broodcoorens, Dorp.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

Sano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

ESPERANTISTOJ!!!

La

KANTARO ESPERANTISTA

Kompilita de Juul Karnas

enhavas 111 kantojn,

estas 112 paĝa,

enhavas ion por ĉies gusto,

enhavas la plej belajn perlojn el la

popolkantoj de ĉiuj nacioj,

estas bele eldonita,

kaj ... kostas nur 6 frankojn!

Mendu ĝin tuj ĉe

H. v. d. Mast. poŝtkonto : 209.852.

Tweelingstraat, 6, Antwerpen.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj

malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

Varbu Abonantojn !

Abonu tuj la monatan gazeton

“ LA JUNA VIVO ”

Jen vi havas la plej malkaran gazeton por gejunuloj kaj komencantoj. Interesa enhavo, facile komprenebla lingvo; tre taŭga legaĵo por kursoj.

Jarabono : 15 fr.

Petu senpagan specimenon de :

Redakcio de « LA JUNA VIVO »

West-Graftdyk N. H.

Nederland.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpevest, 26, Antwerpen.